



**Ejuna
amiko**

INTERNACIA LERNEJA ESPERANTO-REVUO

APRILIO 1977



4-A JARO, N-ro 1 (10)



Nemzetközi
esperantó
diáklap

Megjelenik
évente háromszor
IV. évfolyam,
1. szám, 1977

Felelős szerk.:
Kurucz Géza

Kiadja
a Magyar
Esperantó
Szövetség
1081 Budapest,
Kenyérmező u. 6.

Felelős kiadó:
Vaskó Tibor

Készült
a Somogy megyei
Nyomdaipari
Vállalat
kaposvári üzemében
— 77-234 — 5000
példányban

Felelős vezető:
Farkas Béla igazgató

TASKO
DE ĈIU
ESPERANTISTO:
PROPAGANDI
LA REVUON
INTER LA
KOMENCANTOJ

Laŭ F. Móra

MI KREDAS JE LA HOMO

... Nun, mi ne parolas pri la fido; sed estas klare, ke nia libereco ne egalas tiun de la reĝoj. Esti libera ne plu povas signifi: „fari tion, kion mi volas, nur tial, ke tio plaĉas al mi tiel”. Tia libereco estas la libereco de la ŝton’epoko, kiam la pra-homo mortigis la alian per sia ŝton’hakilo tie, kie li volis. Tia libereco, kiu igus nin ĉiujn reĝoj aŭ sovaĝaj homoj (ne estas diferenco² inter ili), tia libereco rezultigus la dis-falon de la socio, ĉies militon kontraŭ ĉiuj, la sovaĝiĝon de la kultur’mondo, kie blekantaj lupoj³ taŭzus⁴ unu la alian. Nia libereco povas havi nur la jenan en-havon: estas libere fari ĉion, kio ne estas privilegio⁵, sed el-aĉeto; estas libere fari ĉion, kio malmultigas malfeliĉon kaj multigas ĝojon en la mondo!

... Mi konscias, ke ankoraŭ venos ter’tremoj kaj erupcioj⁶, ke multo, kio estas kara por ni, ankoraŭ povos pereji⁷ ...; tamen, mi krias kun firma⁸ fido, ke — tra fumo, nebulo,⁹ funebro¹⁰ kaj malĝojo — mi vidas la landon de la Promeso, en kiu generacio¹¹, pli feliĉa ol la nia, vivos pli homan vivon. Mi fidas la konstantan¹² forton, kiu sen-ĉese agis, por fari ordon el sen-celo, belon el ĥaoso¹³, homecon el kruel-eco¹⁴, amon el per-forto. Mi fidas la aktivan homan bon’volon, kiu estas tiel same forta motoro de la progreso, kiel amo aŭ malsato; kaj kiu (eĉ se ĝi foj’foje ŝajnis sin kaŝi aŭ halti) levis la homaron pli kaj pli alten.

Ankoraŭ vivas multaj homoj, kiuj laboras sklave¹⁵; sed la malkaŝa sklaveco jam mal-

Ferenc Móra (:moo-ra, 1879—1934) elstara hungara verkisto kun profunde humanisma mond'rigardo. La teruraĵoj de la unua mond'milito liveris temon al la suba artikolo, kiu daŭre estas aktuala.¹



aperis. Ankoraŭ ekzistas reĝoj, kiuj amuzas sin per amasa buĉado¹⁶ de homoj fare de homoj; sed neniu plu faras trinkujon el la kranio¹⁷ de la venkito. Ankoraŭ ekzistas malpuraj kaj haladzaĵaj¹⁸ malliberejoj; sed jam maperis la pend'um'iloj, kiuj iam ornamis la ĉirkaŭaĵon de ĉiu vilaĝo.

Ankoraŭ ekzistas multaj super-fluaj doloroj en la ĉiu-tagaj vivoj; tamen, la vivo jam estas pli riĉa kaj pli vivinda, ol ĝi estis dum la pasintaj jar'centoj. Ju pli alten leviĝas la homaro, des pli malkovriĝas sen-limaj eblecoj de feliĉigo antaŭ ĝi. Mi neas la aŭtentikecon¹⁹ de la falinta Babilona turo. La turo staras, la turo konstruiĝas; ekde jar'miloj ĉiu generacio pli-altiĝas, je unu etaĝo, la domon de la homaro; kaj la turo eble servos iam kiel ponto de sur la kaduka²⁰ tero al la frat-taj stelaroj.

La nigraj baraĵoj, kiuj staras inter ni kaj la fina el-formiĝo, efektive estas nigraj kaj timigaj; sed, tra iliaj kelkaj fendaĵoj, tra-bluas la ĉielo, kaj tra-verdas la sun' brila sem-aĵo de la Estonteco. Kaj pri la baraĵoj evidentiĝos: ili estis polviĝ'emaj imagoj same kiel la nuboj. Vero, Realo kaj Eterno troviĝas post ili: bluo de la ĉielo, verdo de la kampo. Al tio ni rigardu, dum ĉiu uragano²¹; tion ni al-proksimigu per forta deziro, kaj ĵetu kontraŭ la vizaĝo de ĉiu timiga fantomo²²: *Mi kredas je la homo.*

Tradukis kaj adaptis: G. Kurucz

1. interesa ankaŭ en la nun-tempo/ 2. malsam-eco inter sam'specaj aferoj/ 3. arbara sovaĝbesto, pra-ulo de la hundo/ 4. dis-ŝirus; dispec'igus/ 5. pli-raĵto krom la komuna raĵto/ 6. subita el-ĵeto de fajro el la interno de monto/ 7. neniigi; morti/ 8. forta; certa/ 9. vaporo en la aero/ 10. malĝojo pro pereo/ 11. id'aro; poste-ul'aro/ 12. ĉiaman/ 13. sen-orda stato/ 14. mal-homeco/15. sklavo: sen-raĵta homo vendebla/ 16. buĉi: mortigi kutime beston/ 17. osto de la kapo, kiu en-havas la cerbon/ 18. malbon'odoraj/ 19. aŭtentika: vera, fakta/ 20. fal'onta; mal-junega/ 21. fulmo-vetero, kun tondrado kaj ventego/ 22. post-morta re-aper'anto.

PIED'NOTOJ al „De sago sur arbo al moderna alfabeto” (4-a paĝo)

1. pra-tempa pafilo; longa pinta branĉeto elpafebla/ 2. skribi ion por ne forgesi ĝin/ 3. grandega pra-besto/ 4. tio, kion oni esploras/ 5. si-la-bo:son'grupo; tiu ĉi vorto konsistas el tri silaboj.

SUKCESO EN JAPANIO

En „Asahi Ĉugakuŝei Weekly”, gazeto por mez'lerneĵanoj en Japanio, aperis artikolo el JUNA AMIKO „Kurioza matematika problemo” (8—9-a n-ro). Multaj japanaj geknaboj sendis ĝustajn solvojn.

DE SAGO SUR ARBO AL MODERNA ABOCO

I

Longa tempo for-pasis ĝis tiam, kiam la infanoj ricevis librojn. Longa tempo pasis, dum oni el-pensadis la manieron kiel trans-doni ideojn de unu homo al aliaj. Fakte, la homoj komprenis sin pli bone ol la bestoj; ili ja parolis, ne blekis. Ili parolis, sed ne povis noti² tion, kion ili diris; alivorte: ili ne povis konservi la parolon.

Por la pra-homoj, ekzemple, estis necese montri la vojon al

kaptita mastodonto³. Por tio, ili fiksitis sagon sur arbo. La pinto de la sago montris en la direkto de la kaptita besto. Post tre longa tempo, la homoj — ne plu prahomoj, sed veraj kulturhomoj — pentris bildojn (oni nomas la manieron „ideografio”); kaj tiel, ili trans-donis la ideojn al aliaj sam'temp'uloj kaj al la poste-uloj.


Kaj denove, for-fluis multe da tempo kaj multe da akvo en la riveroj... La parolo estis plu esplorata⁴. Saĝaj homoj malkovris, ke la ideoj (tio estas: frazoj kaj vortoj) estas disigebraj en silabojn⁵, eĉ en unuopajn sonojn. Kaj tiel oni trovis la fundamenton de nia aboco.

Ĝis tiu tempo, tuta ideo estis notita per unu bildo. Kaj, ĉar la ideoj estis multaj, ankaŭ la nombro da bildoj estis granda kaj konserv'enda en la memoro. La el-trove noti unu-opajn sonojn per apartaj literoj estis do vera revolucio, ĉar ekzistas nur proksimume 35 parol'fonoj. Tiom da literoj sufiĉas por esprimi niajn ideojn, dezirojn, volojn kaj pensojn; do tre simple ĉion, kion homoj volas komuniki al siaj hom'fratoj.

J. Klement (Ĉeĥoslovakio)

DAŬRIGO SEKVOS

ABC
POR KŬHENCANTOJ



Henryk Sienkiewicz (:henrik sjenkjeviĉ) estas mond'fama pola verkisto. Ni memoras pri li okaze de la 130-jara dat're-veno de lia naskiĝo, kaj de la 60-jara datreveno de lia morto.

Ekster-lande, li estas konata, ĉefe kiel la aŭtoro¹ de „Quo vadis?” (Kien vi iras?), kiu al-portis al li Nobel-premion en la jaro 1905, kaj kiu estis modele² tradukita en Esperanton fare de Lidia Zamenhof, filino de L. L. Zamenhof. La tradukaĵo aperis libro-forme en 1957.

„Quo vadis?” estas historia romano pri la antikva³ Romo en la tempo de Nerono. En ĝi, estas prezentita la batalo inter la malnova mond'rigardo kaj la tiu-tempe nova ideo: krist'anismo.

Laŭ Wl. Zytynski (:jitynski)



Henryk Sienkiewicz

ROMO EN FLAMOJ⁴

(Fragmentoj el la ĉapitro XLVII de „Quo vadis?”)

La fajro atingis dume, ĝis la strato *Via Nomentana* kaj, de ĝi, kun aliĝo de la vento, turnis sin al la strato *Via Lata* kaj al la rivero *Tibero*, ĉirkaŭ-iris *Kapitolon*⁵, dis-verŝis sin tra la placo *Forum Boarium*, kaj detru'ante ĉion, kion ĝi preter-lasis en la unua impeto⁶, proksimiĝis denove al la monteto *Palatino*.

Tigellinus sendis kurieron post kuriero⁷ al la proksim'iganta cezaro⁸, ke li nenion perdos el la grandiozeco⁹ de la spektaklo¹⁰, ĉar la brulo eĉ pli-kreskis. Sed *Nerono* volis al-veni nokte, por tiom pli ĝui la bildon de la pereanta¹¹ urbo...

Ĉirkaŭ nokto-mezo, li proksimiĝis, fine, al la muroj, kune kun siaj korteg'anoj. Dekses mil pretorianoj gardis la trankvilecon kaj sekurecon¹² de lia en-veturo. La popolo insultis¹³, vere, kriis kaj fajfis¹⁴ je la vido de la cezara anaro, sed ĝi ne kuraĝis ĝin ataki.

For, en la urbo, siblis¹⁵ fajraj serpentoj¹⁶ kaj brulis la antikvaj, plej karaj memorajoj: brulis la templo¹⁷ de *Herkulo* kaj la templo de *Jovo Statoro*, meze de fajraj langoj troviĝadis, ia-foje, *Kapitolo*; brulis la pasint'eco kaj la animo de *Romo*, kaj li, la cezaro, staris kun liuto¹⁸ en la mano, kun vizaĝo de tragik'aktoro¹⁹, kaj kun penso ne pri la pereanta patrujo, sed pri sin-teno kaj vortoj, per kiuj li povus esprimi plej bone la grandecon de la katastrofo²⁰, veki plej grandan admiron kaj akiri plej varmajn aplaŭdojn²¹.



Li malamis tiun ĉi urbon; li malamis ĝiajn loĝantojn; li amis sole la proprajn kantojn kaj versaĵojn; do li ĝojis en la koro, ke fine li vidas tragedion, similan al tiu, kiun li pri-skribis. La vers'faristo ĝuis la teruran spektaklon, kaj kun sen-lima plezuro pensis, ke eĉ la detruo

de *Tro-jo* estis nenio, kompare kun la detruo

de tiu ĉi grandega urbo. Kion pli li povus deziri? Jen *Romo*, la mond'potenca²² *Romo*, brulas, kaj li staras kun ora liuto en la mano. Ie, for, mal-supre, en la ombro, murmuris kaj tumultas²³ la popolo. Sed ĝi murmuru! Jar'centoj pasos, jar'miloj fluos for, kaj la homoj memoros kaj gloros²⁴ la poeton, kiu en tia nokto pri-kantis la pereon kaj brulon. Kio estas, kontraŭ li, *Homero*?



Kaj li levis la manojn, kaj ek-bat'inte la kordojn²⁵, ekkantis la vortojn de *Priamo*:

„Nesto²⁶ de miaj patroj, ho lulilo²⁷ kara!...”

Nun neniuj jam dubis, ke la cezaro mem ordonis bruligi la urbon, por fari al si spektaklon, kaj kanti ĉe ĝi kantojn.

Tradukis: Lidia Zamenhof

Albert Lienhardt (: linhart)



Luko kaj Viko estas du junaj fratoj. *Luko* estas kvarjara, kaj *Viko* estas kvin-jara.

En iu dimanĉo, la du knabetoj iris fari viziton al la avino, kiu loĝas en la sama strato.

Post la salutado, *Viko* demandis:

„Aŭskultu, avinjo! Ĉu vi volas ludi kun ni?”

„Tre volonte”, afable respondis la avino,

„des pli volonte, ke vi ambaŭ ja ĉiam estas tiel ĝentilaj knaboj”.

„Bone”, diris *Viko*; „se vi konsentas, ni volas ludi la ludon *Zoologia Ĝardeno*”.

„Mi ne konas tiun ludon”, diris la avino, iom mir’ante.

„Estas simple: *Luko* kaj *mi*, ni estas simioj”, eksplikis² la nepo.

„Vi estas simioj??” miris la avino pli kaj pli. „Kaj kian rolon mi devos ludi?”

„Nu”, diris *Luko*, „vi ludos la rolon de bon’kora maljuna sinjorino, kiu nutras³ la simiojn per bombonoj kaj ĉokolado!”

1. besto-ĝardeno/ 2. klarigis/ 3. kreskigas per mangaĵoj.

1. tiu, kiu kreis ion/ 2. modela: inda servi kiel ekzemplo/ 3. pra-tempa/ 4. flamo: hela brilo de fajro-lango/ 5. nomo de belega konstruaĵo en la antikva Romo/ 6. granda energio; puŝ’forto/ 7. kuristo/ 8. imperiestro; la estro de Romio/ 9. grandioza: bela pro sia grandeco/ 10. teatra aŭ simila vidaĵo/ 11. neniig’anta; mort’anta/ 12. sekura: ne-danĝera/ 13. esprimis malamikecon per fiaj vortoj/ 14. el-igis akrajn sonojn inter la lipoj/ 15. blekis kiel serpento/ 16. longa danĝera sen-piedulo/ 17. preĝejo/ 18. antikva muzikilo/ 19. tragedio: malĝojega okazaĵo; tragika: tragedia/ 20. granda subita malfeliĉo/ 21. kun-frapado de manoj por esprimi plezuron/ 22. potenco: povo, forto/ 23. sen-orde inter-puŝiĝas/ 24. laŭdos kiel dion/ 25. fadeno por muzikilo/ 26. birda loĝejo/ 27. liteto por suĉ’infano.

JIRI KORÍNEK (Ĉeĥosl.)

SEN HOMA MEZURO

Ho kiel grandas universo¹,
kaj kiel eta estas mi,
kaj sen-signifa mia verso
kaj mia trist² kaj nostalg³!

Ke tamen ega ŝajnas homo
al viruseto⁴ sur polver⁵,
al cent-mil-ono de atomo . . .
kia miraklo⁶ kaj mister⁶?

Se mikrokosmo⁷ kosmon⁸
formas,
ne bagatelas⁹ homa sort⁹;
en sekvoj eta kaŭz⁹ enormas¹⁰;
gravegas iam simpla vort⁹.

Sam'gravas eksplodeg⁹ de
astro¹¹
kaj ek-rideto de knabin⁹
kaj nia ĝoj⁹ kaj zorg⁹ balasto¹²,
en sen-tempeco kaj sen-fin⁹.

Ĉar sam'valoras la sekundo
kaj mil lum'jaroj en etern¹³;
kaj, fine, nur en kor'profundo
kuŝas de granda solvo kern¹⁴.

1. tutaĵo de ĉio, kio ekzistas/ 2. malĝojo/ 3. forta deziro reveni al hejmo/ 4. treege malgranda estaĵo, kiu kaŭzas malsanon/ 5. nekredablaj okazaĵo aŭ fakto/ 6. ne-klarig'ebla afero/ 7. mondo de atomoj/ 8. sen-fina mondo-spaco/ 9. malgravas/ 10. havas grandegan signifon/ 11. ĉiela korpo, ekzemple stelo/ 12. balasto: necesas ŝarĝo/ 13. io, kio daŭras ĉiam sen komenco, nek fino/ 14. centra kaj plej grava parto de io.

LA RUBRIKON¹ GVIDAS

Josef Chosta (:ĥvosta)
Engelsova 289,

290 01 PODEBRADY
Ĉeĥoslovakio

Sendu ĉiun korespondadon
rekte al tiu adreso!



La konkurson, en al numero 3 (6) neniuj partoprenis. Ĉu ĝi ne plaĉis? Skribu pri tio vian opinion!

○ Hella Sauerbrey, la animo de nia KJA/2, estis delegitino² de la virina mond'kongreso en 1975. Skribu al ni, en kiu monato kaj en kiu urbo ĝi okazis!

○ En la lasta rubriko, aperis *Ksaver Ipsilono* (X. Y.), kiu sendis al ni iom konfuzan³ leteron. Sed, eble, li nur ŝercis. Tie ĉi estas lia nova letero. En ĝi, vi denove trovas strangajon⁴, sed ĝi montras, ke li ne estas malsaĝa. Tamen, li ne sendis foton. Helpu kaj desegnu, kiel vi lin imagas! La plej bona bildo certe iĝos simbolo⁵ de tiu ĉi rubriko; ĉar sciu, ke li volas skribi novajn leterojn! Li estas normala knabo, eble "bubo"⁶, iom frenezeta, interesig⁷anta pri la vivo.

○ X. Y. skribis al ni leteron, en kiu li parolis pri sia vivo kaj tagordo. Sed li atentigis nin, ke li uzas alian tempo-mezuron; nome,

laŭ li, la tago havas 10 horojn, ĉiu horo havas 100 minutojn, kaj ĉiu minuto havas 100 sekundojn. Li asertas⁷, ke tio estas pli bona, ĉar oni povas kalkuli: 1 minuto=0,01 horo kaj 1 sekundo=0,0001 horo. Kaj, en sia teksto⁸, li uzas tiujn novajn tempomezurojn, eĉ se li devas rondigi⁹ ilin. Skribu al ni la ĝustajn tempojn, laŭ nia kutima tempomezuro, kaj skribu krome, kiel longaj estas — ĉe li — la horoj, minutoj kaj sekundoj!

„Ciu-matene, mi leviĝas je la 2-a kaj 62 minutoj. Tiel, mi havas po 10 minutoj por lavi kaj vesti min. 20 minutoj estas por la maten'manĝo. Je la 3-a kaj 19 minutoj, mi ekiras al la lernejo. La instruado komenciĝas je la 3-a kaj 33 minutoj. La lecionoj daŭras 31 minutojn. La tag'manĝo estas post la 5-a horo. Lunde, mi for-lasas la lernejon je la 6-a kaj 67 minutoj; en aliaj tagoj: pli frue. Somere, mi ludas ekstere ĝis la 7-a kaj 71 minutoj. Ni manĝas vespere je la 7-a kaj 75 minutoj. Por hejmaj taskoj, mi havas 25 minutojn. Mi iras dormi je la 8-a kaj 95 minutoj.

Sabate posttagmeze, mi plej ofte estas en la kun-veno de nia KJA/6. La kunvenoj komenciĝas je la 5-a kaj 83 minutoj kaj daŭras 125 minutojn. Por dimanĉoj, ni planas ekskursojn kaj vojaĝojn, kiuj daŭras almenaŭ 2 horojn.”

Bon'volu sendi vian leteron ĝis la apero de la nova numero. Ni rekompencos¹⁰ ĉiun leteron per Esperantaĵo.

1. parto en gazeto/ 2. homo, sendita ien, fare de organizo/ 3. malklara; erar'plena/ 4. ne-kutimaĵo/ 5. videbla signo/ 6. knabo, kiu foj'foje kondukas ne-bone/ 7. ĉiras kun graveco/ 8. skribaĵo/ 9. doni ne tute precize/ 10. premioj.

GOJIĜA SCIIGO DE LA REDAKCIO



Sajnas, ke tiu ĉi 10-a numero de JUNA AMIKO estos aparte memorinda.

Dank' al la helpemo de multaj divers'naciaj amikoj — kiuj rimarkis, ke JUNA AMIKO estas pli ol simpla revueto —, ni povas nun, post longe-daŭra malcerteeco, komenci novan epokon — epokon de regula aperigado. Kaj se la publiko ankoraŭ pli forte sub-tenos nin, la revueto certe baldaŭ povos el-iri pli ofte, dum unu jaro.

Bon'volu bone noti ke, de tiu ĉi numero, pro praktikaj kaŭzoj, ni akceptas abonojn por KALENDARA JARO. Tio signifas, ke tiu ĉi numero estas la 1-a, la 2-a aperos en septembro kaj la 3-a — en decembro.

Abono al JUNA AMIKO eblas ĉe UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando) kontraŭ 5,70 guldenoj; ĉe Ludwig Pickel (Pf. 2113, D-85 Nürnberg 1) kontraŭ 5 markoj; por hungaroj ĉe HEA (Pf. 193, H-1368 Budapeŝt 5.) kontraŭ 15 forintoj; aŭ ĉe opaj naciaj perantoj, kiuj anoncas pri tio en diversaj naciaj bultenoj.

APOGU LA REVUETON!
VARBU ABONANTOJN
AL JUNA AMIKO!



Arabo perdiĝis en dezerto¹. Jam dum tri tagoj, li vagis² sen-es-pere, tra la sablo-mar, duon'morte malsata.

Ĉu li trovos ion por manĝi kaj sub-teni sian forton? Aŭ ĉu li falos sen-pova, kaj pereos³ en la sabla maro?

Subite, liaj okuloj ek-brilas kun espero. Jen loko, kie estas post-signoj de karavano⁴, kiu antaŭ nelonge ripozis ĉi tie. Sur la sablo kuŝas malgranda leda⁵ saketo, verŝajne perdita. Li palpas⁶ ĝin. La saketo estas plena de malgrandaj objektoj. Certe: daktiloj⁷ aŭ nuksoj⁸! Tio estas savo. Kun tremantaj manoj, la arabo rapidas malfermi la saketon.

Ho, kia malreviĝo! Interne estis nek daktiloj, nek nuksoj — interne estis nur perloj⁹.

1. sen-lima ne-loĝ'ata sablaro/ 2. iris ne trov'ante el-iron/ 3. mortos/ 4. aro da komercistoj kun iliaj ŝarĝ'bestoj/ 5. felo sen-harig'ita kaj prepar'ita/ 6. per-mane tuŝetas/ 7. dolĉa frukto de varm'zona arbo/8. frukto kun osto-ŝelo
9. brilanta globeto.

VIVU LA STEL'!


Vortoj kaj muziko laŭ Agnes B. Deans

The musical score is written on six staves in a single system. The key signature has two flats (B-flat and E-flat), and the time signature is 6/8. The first staff begins with a dynamic marking of *mf*. The lyrics are written below the notes. The second staff has a dynamic marking of *f*. The third staff has a dynamic marking of *f*. The fourth staff has a dynamic marking of *ff*. The lyrics are:
Plen - ig - u la glas - on, Ho ĉi - u bon - ul',
Viv - u la Verd - a Stel'! Kaj kant - u la hom - o - j el
ĉi - u an - gul'. Viv - u la Verd - a Stel'!
Viv - u la, viv - u la, viv - u la Stel'!
Viv - u la, viv - u la, viv - u la Stel'! Viv - u la Stel'!
viv - u la Stel'! Viv - u la Verd - a Stel'!

2. Plenigu la glasojn kaj tostu¹
kun ni,
Vivu la verda stel'!
La lingvo kreita por ĉiu naci'
Vivu la verda stel'!

Per voĉoj de nia kun-labor-
antar'
Vivu la verda stel'!
Resonu la voĉoj sur tero kaj mar'
Vivu la verda stel'!

1. trinku vinon je la sano de io aŭ iu.



★ D-ro H. R. Tonkin, la prezidanto
de UEA

SCI'END'AĴOJ PRI UEA

La plej supera organizaĵo de la tut'monda esperantistaro estas *Universala¹ Esperanto-Asocio²* (UEA). Ĝi estas, unua-vice, la verko de 21-jara svisa junulo, *Hector Hodler*. Ĝi estis fondita en 1908.

De post la jaro 1955, la ĉef-sid-ejo de UEA estas en Nederlando (*Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM — 3002*).

La celoj de UEA estas:

(a) *dis-vastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;*

(b) *pli-faciligi ĉiu-specajn spir-ritajn³ kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco⁴ pri naci-eco, raso⁵, religio, politiko aŭ lingvo, kaj dis-volvi⁶, ĉe ili, re-ciprokan komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj.*

UEA alligas la esperantistojn en du manieroj.

Al-iĝo al Landa Esperanto-Asocio estas sam'tempe aliĝo al UEA (escepte kelkajn landojn). Tiuj aliĝ'intaj esperantistoj estas la *Asociaj Membroj*. Ili pagas koti-



zon⁷ nur al sia Landa Esperanto-Asocio.

Krom la Asocioj Membroj, ekzistas *Individuaj⁸ Membroj*. Ili pagas kotizon rekte al UEA. Neplen'ag'uloj, kiuj deziras fariĝi Individuaj Membroj, bezonas skriban konsenton de siaj gepatroj.

La Individuaj Membroj ricevas la *Jar'libron*, kaj ilia plej-multo, estante Membroj-Abonantoj, ricevas krome la monatan oficialan⁹ organon¹⁰ de UEA: „*Esperanto*”. Multaj Membroj-Abonantoj prenas sur sin volont'ulan laboron por la utilo de siaj ali'landaj homfratoj. Ili estas la *Delegitoj*, kiuj sen-page plenumas diversajn servojn kaj donas informojn. La adresaro de pli ol 3000 Delegitoj en 64 landoj troviĝas en la Jarlibro.


La laboro de la Asocio estas gvid'ata de la *Komitato*. Ĝi elektas el inter siaj vicoj la *Estraron* (nun 8-membra) kaj la direktoron de la *Centra Oficejo (CO)*, kiu respondecas pri la kur'antaj aferoj de UEA.

Pro siaj meritoj, UEA plur'foje estis proponita por Nobel-pac'premio; kaj, ekde 1954, ĝi estas en konsultaj¹¹ rilatoj kun UNESCO.

1. tut'monda/ 2. grava organizaĵo/ 3. rilata al la pens'anta parto de la homo/ 4. malsam'eco/ 5. granda homa grupiĝo laŭ de-veno/ 6. disvastigi/ 7. jara membro-pago/ 8. ĉiu estaĵo kiel unuo/ 9. ne-privata/ 10. gazeto de asocio/ 11. informo-dona; kun-labora.

Cifera kruc'enigma

Horizontale (→): 2. La jaro, en kiu mortis L. L. Zamenhof; 4. La fondo-jaro de Universala Esperanto-Asocio; 5. Unio¹ Internacia de Telekomunikado²



akceptis Esperanton kiel lingvon por telegrafio³; 6. Nombro da vortradikoj en la Plena Vortaro; 7. En tiom da landoj, oni legas la centran pres'organon de UEA: „*Esperanto*”.

Vertikale (↓): 1. Jaro de la 1-a Universala Kongreso de Esperanto; 2. En tiu jaro aperis „*Pilgrimo*”, poemaro⁵ de Julio Baghy; 3. La honora membraro de UEA konsistas el tiom da personoj; 4. En tiu jaro aperis la revuo „*Nia Voĉeto*” (nuna „*Kalejdoskopio*”); 5. En julio de tiu jaro, Zamenhof aperigis sian verkon: „*Lingvo Internacia*” (*Unua Libro*).

1. unu-iĝo/ 2. diversaj formoj de dissendado de informoj/ 3. transsendo de skribaĵoj/ 4. vojaĝo al sankta loko/ 5. vers'aj'aro.

Miuj karaj Kastoroj!

Denove, post iom longa paŭzo, mi havas la okazon skribi al vi. Dum tiu paŭzo, nia revuo JUNA AMIKO renkontis malfacilaĵojn. Nun, ĝi denove aperas, kaj mi volas raporti al vi pri la stato de via Klubo.

Hodiaŭ, kiam mi skribas, nia membraro konsistas el 198 membroj ĝis la aĝo 18-jara. Post tiu aĝo la membreco ĉesas, krom se la Kastoro informas min, ke li/ŝi deziras daŭre esti membro de la Klubo, aŭ se li/ŝi estas elektita Honora Kastoro.

Skribante pri la membreco, mi volus memori la Kastoretojn, ke ili rajtas teni tiun gradon dum nur unu jaro, kaj se post tiu periodo ili ankoraŭ ne fariĝis Brunaj Kastoroj, ili ĉesas aparteni al la Klubo.

Jen estas la nomoj de tiuj membroj, kiuj atingis pli altan gradon post la apero de nia lasta Letero. Bedaŭrinde, neniu atingis la Oran gradon dum tiu tempo; sed, kiel vi vidas, ni nun havas 16 novajn Brunajn, kaj 13 novajn Arĝentajn² Kastorojn.

FARIĜIS BRUNAJ KASTOROJ:

MALLIA, Mario
MALLIA, Johano
(Ambaŭ en Malto)
SZABÓ, Maria
BAUER, Gabriella
ERDÉLYI, Maria
METLESICS, Johano
KOVÁCS, Adalberto
HERGER, Andrea

VAJDA, Ēva
ESZTERGÁLYOS, László
MALASICS, Ágnes
SZŪCS, Péter
VAGYÓCZKI, György
SZIGETI, Sándor
KURUCZ, Zoltán
TITKOVICS, Lajos
(Ĉiuj en Hungario)

FARIĜIS ARĜENTAJ KASTOROJ:

CSATLÓS, Ildikó
DALLOS, Kristina
FARAGO, Marta
KOVÁCS, Aleksandro
STEZÁK, Johano
SCHLEFFER, Maria
SZABÓ, Maria

KATONA, Ēva
KIMMEL, Elizabeta
KOVÁCS, Ágnes
VÁCZI, Adalberto
MALASICS, Ágnes
SZŪCS, Péter
(Ĉiuj en Hungario)

Jam pasis sufiĉe da tempo, post kiam mi donis klarigojn pri la KASTORA KLUBO de ESPERANTO; kaj tre kredeble, estas jam multaj legantoj de JUNA AMIKO, kiuj ne scias, kio ĝi estas. Jen do, kelkaj klarigoj.

La KASTORA KLUBO de ESPERANTO estas internacia klubo por geknaboj, kiuj scias aŭ lernas Esperanton. Ĝi akiris sian nomon el sia naskoloko, malgranda urbo Denton en Anglio.

La ĉefa industrio de Denton estis la fabrikado de ĉapeloj, por kiuj, en malnovaj tempoj, oni ofte uzis la felon de kastoro, kaj tiu besto aperas sur la urba blazono³, kaj ankaŭ sur la blazono de la lernejo, en kiu nia Klubo „naskiĝis”.

Malsimile al la pli-multo de kluboj, membr-eco en la KASTORA KLUBO estas sen-paga; sed, por esti membro, vi devas lerni kaj parkere ripeti al via Esperanto-instruisto, ĉi tiun tri-opan promeson:

„Mi promesas diligente lerni Esperanton”;

„Mi promesas ĉiam porti la verdan stelon”;

„Mi promesas ĉiam konsideri ĉiun alian homon kiel fraton, de kiu ajn raso⁴, koloro aŭ kredo li estas”.

Kiam vi faris tion, petu vian instruiston skribi al la Ĉefa Kastoro (adreso: 3 Berwick Avenue, Urmston, MANCHESTER, M31 1PS, Anglio), kaj certigi, ke vi bone ripetis la promeson, kaj komprenas ĝian signifon. La instruisto devas doni (a) vian familian nomon; (b) vian personan

nomon; (c) vian adreson; (ĉ) ĉu vi estas knabo aŭ knabino; (d) vian naskiĝ-daton.

La Ĉefa Kastoro poste sendos al vi atestilon pri via membreco kun la komenca rango de Kastoreto.

Sed vi certe ne dezirus longe resti en tiu malalta rango! Kaj kiel vi jam legis, vi ne rajtas resti Kastoreto dum pli ol unu jaro, ĉar ni esperas, ke antaŭ la fino de tiu tempo, vi jam



atingos pli altan rangon. La unua „plena” rango estas tiu de Bruna Kastoro kaj, post tio, vi povos atingi la rangon de Arĝenta Kastoro kaj, fine, la ran-

gon de Ora Kastoro. Kiam vi atingos „plenan” rangon, vi ricevos belan insignon, de kiu ni montras foton.

KIEL ATINGI LA PLI ALTAJN RANGOJN?

Por atingi ĉi tiujn rangojn, oni devas plenumi la jenajn kondiĉojn:

BRUNA KASTORO

1. devas esti Kastoreto dum almenaŭ unu monato;
2. devas lerni kaj parkere ripeti la unuajn ok liniojn de „La Espero”;
3. devas korespondi kun almenaŭ unu ali’landa esperantisto (vidu A).

ARĜENTA KASTORO

1. devas esti Bruna Kastoro dum almenaŭ unu monato;
2. devas ĉiam porti aŭ la verdan stelon, aŭ la Kastoran insignon;
3. devas lerni kaj parkere ripeti dek liniojn de iu Esperanta versaĵo (krom „La Espero”);
4. devas korespondi kun almenaŭ du alilandaj esperantistoj (vidu A);
5. devas aboni almenaŭ unu Esperanto-gazeton (vidu B).

ORA KASTORO

1. devas esti Arĝenta Kastoro dum almenaŭ unu monato;
2. devas ĉiam porti aŭ la verdan stelon, aŭ la Kastoran insignon;
3. devas lerni kaj parkere ripeti la tuton de „La Espero”;
4. devas korespondi kun almenaŭ tri alilandaj esperantistoj (vidu A);
5. devas partopreni iun nacian aŭ internacian (sed ne nur regionan) Esperanto-kongreson, aŭ viziti esperantiston en alia lando.

A: povas esti infano aŭ plen’kreskulo (ekzemple Onklo aŭ Onklinlo Esperantista — vidu sube);

B: povas esti la gazeto JUNA AMIKO!

GEONKLOJ ESPERANTISTAJ

estas organizaĵo, kiu trovos por vi „onklon” aŭ „onklinon” en alia lando, kiu korespondos kun vi en Esperanto. Se vi deziras tian onkl(in)on, skribu al: GEONKLOJ ESPERANTISTAJ, 3 Berwick Avenue, Urmston, MANCHESTER, M31 1PS, Anglio.

AL LA GEINSTRUISTOJ

Geonkloj Esperantistaj ĉiam bezonas spertajn esperantistojn, kiuj estas pretaj agi kiel geonkloj. Petu detalojn pri la devoj, ĉe la ĉi-supra adreso! La laboro estas ĝojiga kaj helpa al la movado!

1. tiuj, kiuj atingis pli altan rangon/ 2. arĝento: peza blanka metalo (Ag), malpli valora ol oro/ 3. granda insigno/ 4. ĉiuj homoj de unu pra-familio.
1. vorto kun la sama senco.

SAJNAJ VORT'KUN-METOJ

Neniu el la subaj vortoj estas kun-metaĵo; tamen, en lingvo-ludo, ili povas esti konsider'ataj kiel tiaj.

Unue, mi klarigas aparte, per ĉirkaŭ-skribo, la du „konsistigajn vortojn” de la kunmetaĵo; kaj due — post egaleca signo — ankaŭ la tuton. Pri-atentu unu ekzemplon:

Kiras' de sen-ostaj mar'estaĵoj + granda arbara besto = inter-me-zuro de kapabloj

Solvo: konk' + urso = konkurso

Kaj nun, sen helpo, al-iru la sekvajn taskojn!

1. *Super-homa estaĵ' + tiu, kiu amas = multe-kosta ŝtono*
2. *Ĉef'urb' de Italio + membro = longa ne-versa verko*
3. *Dolĉa bakaĵ' + vasta aro da domoj = grandega frukto de grimpa kreskaĵo*
4. *Sango-suĉa insekt' + alta konstruaĵo = civilizo*
5. *Skribo-sign' + alta kuir'vazo = manĝaĵo el kuiritaj fruktoj kun dolĉa akvo*
6. *Estr' de kred'antoj en Romo + patro de patro aŭ patrino = ĝardeno kreskaĵo*
7. *Sinonimo¹ de VI + reĝa seĝo = flava acid'suka frukto*
8. *Parto de spaco + tio, kio igas personon agi = maŝino, kiu tiras vagonojn*
9. *Sinonimo de APUD + malalta ter'parto inter montoj = granda dom'besto*
10. *Korpo-part' inter kapo kaj trunko + la plej malalta vira voĉo = manĝaĵo el viando*
11. *Sat'ata manĝaĵ' de ĉevalo + alta konstruaĵo = interesa tra-vivaĵo*
12. *Ĉiu-taga manĝaĵ' de Eŭropanoj + „mal-ĉielo” = danĝera rabo-besto*
13. *Mus'pel'ula + versaro = subita malfeliĉo*
14. *Farunaĵ' + motor'veturilo = fortega bokso-bato*


Sendu viajn solvojn antaŭ la 1a de septembro al s-ro Dieter Berndt, Berlinstr. 2., DDR-102 BERLIN!

1. vorto kun la sama senco.


MIRAKLA¹ KURACILO

Uzbeka sciencisto, Adil Saripovič Sarikov esploris, dum 20 jaroj, la mond'faman balzamon²: *mumijao*, kiun popoloj kuracistoj uzis, dum jar'centoj, en multaj landoj. Mumijao estas el-ŝvitaĵo de rokaj³ fendoj⁴ en la alteco de 1500 ĝis 3000 metroj. La de-veno de mumijao ankoraŭ ne estas konata.

Miloj da eksperimentoj⁵ montris, ke mumijao: (a) rapidigas — je 15 tagoj! — la kun-kreskon de rompitaĵoj ostoj; (b) pli-bonigas la funkciojn de internaj organoj; (c) aktivigas⁶ la nervan sistemon⁷; (ĉ) mortigas kelkajn pusigajn⁸ mikrobojn⁹, al kiuj ne efikas penicilino; (d) pli-bonigas la staton ĉe radio-malsano.



1. apenaŭ kredebla; kvazaŭ fabela/ 2. mirakla kuracilo/ 3. roko: ŝtonego/ 4. mallarĝa laŭlonga truo/ 5. scienca provo/ 6. vigligas; pli-bonigas/ 7. nervo: sento-fadeno en homa korpo; sistemo: kunaĵo de io; ĉi tie: de nervoj/ 8. densa flaveta produkto de vundoj/ 9. mikroskopaj estaĵoj/ 10. verko, kiu enhavas resumon de homaj scioj/ 11. kverko: arbo-speco kun malmola ligno/ 12. furioza, malbonega virino/ 13. mallarĝa kaj longa peco el maldika materialo/ 14. mortiga/ 15. ŝoki: efiki ne-el-teneble forte al iu.



SUB-AKVIGA PUN'SEĜO

A n g l i o

Laŭ la „Karta enciklopedio¹⁰⁾ de G. Marin

Dum la 16-a kaj 17-a jarcentoj, speciala seĝo el kverka¹¹ ligno, aŭ malofte el fero, estis uzata por puni „furiojn¹²⁾“.

Oni sidigis la virinon en ĝin, fiksitis ŝin per fera bendo¹³, kaj subakvigis la malfeliĉ'ul'inon dum iom da tempo kune kun la seĝo.

Juĝisto decidis, kiom da subakvigoj oni donu al la „virinaĉo“.

Okazis, ke la puno estis pereiga¹⁴: la pun'ata virino mortis pro nervo-ŝoko¹⁵.

Oni povas ankoraŭ vidi tiajn punseĝojn en kelkaj anglaj muzeoj.

La libreto „G. Marin vizitas sian hejmon — la mondon“ estas havebla ĉe la libro-servo de UEA, aŭ ĉe la eldonisto: Eld. IKS, P. p. 703, YU—41001 ZAGREB, Jugoslavio.

MILITOJ

KONTRAŬ TERPOMO

La patrujo de ter'pomo estas Suda Ameriko, kie la indianoj¹ plantis ĝin jam antaŭ la al-veno de la hispanoj, kaj kie, ĝis nun ĝi kreskas ankaŭ sovaĝe. En Eŭropo, oni plantis terpomon, unue, en Hispanio kaj Anglio. El tiuj landoj ĝi disvastiĝis en la aliajn. Tio okazis en la 16-a kaj 17-a jar'centoj.

Dum longa tempo, ĉefe la nobelaro² plantis terpomon. Okaze de bankedoj³, ili regalis⁴ la gastojn per frandaĵo: kuiritaj terpomoj kun cinamo⁵. Krom tio, la terpomujo servis por ili, kiel ornama planto. En Francio eĉ la reĝo portis terpomajn flo-rojn kiel ornamaĵon.

Dum la 30-jara milito, mize-ro⁶ kaj malsato rapidigis la disvastigon de terpomo. La nobelaro ek-plantis ĝin sur grandaj kampoj, dum la servutuloj⁷ ape-naŭ konis ĝin.

En la 18-a jarcento, pro mal-abundo⁸ de greno⁹, la prusaj nobeloj per-forte plantigis, en kel-kaj lokoj, la ne tre pretend-eman terpomon ĉe siaj servut-uloj. Sed tiuj ĉi ne fidis al la nova planto, mult'loke ili rifuzis planti terpomon, kaj ribelis aŭ difektis la plantojn sur la kampoj. La nobelaro ofte uzis eĉ soldatojn por sub-premi ri-belojn kontraŭ terpomo. Tiuj bataloj ricevis la nomon „ter-pom'militoj”.



LA SPIKOJ¹¹


Kampano iris kun sia fileto en la kampon por vidi, ĉu la greno⁹ baldaŭ estos matura.

„Paĉjo”, diris la knabeto, „kial kelke da spikoj kliniĝas¹² tiel malalte, dum aliaj levas sian kapon rekte? Tiuj ĉi eble estas la plej bonaj, kaj la aliaj, kiuj sin mallevas, certe estas ne-taŭgaj.”

La patro de-ŝiris kelkajn spikojn kaj diris:

„Rigardu! Tiuj spikoj, kiuj modeste kliniĝas, estas plenaj je la plej bela greno; la aliaj, kiuj sin tenas tiel fiere¹³, estas tute malplenaj kaj netaŭgaj.”

Laŭ „Esperanta legolibro” de Elio Migliorini (Italio)



Feliĉe, oni baldaŭ re-konis la utilon de terpomo kaj, post ne longa tempo, ĝi fariĝis preskaŭ ĝenerala nutraĵo¹⁰ precipe ĉe malriĉaj homoj, kiuj antaŭe militis kontraŭ ĝi. Dank' al terpomo, ne plu okazis malsatmortoj en Eŭropo, eĉ se la gren'rikolto estis malsufiĉa, kaj preskaŭ malaperis la malsano pro manko de C-vitamins, kies fonto estas terpomo.

Laŭ ĉeĥa Esperanto-lernolibro

La verbo¹⁶ A) Prezenco¹⁷. Stato

Sorbu¹⁸ nun, lernanta cerbo¹⁹,
la ideon pri la verbo!

Ek-atentu ĉi konstaton²⁰:

Agon signas verb', aŭ *staton*.

Se dum lecion' vi dormAS,

al la ordo ne konformAS²¹

tiu STAT'. Finaĵo „AS” —

por prezenco — la kompas'²²

Kaj la senco

de l' prezenco:

Temp', en kiu ni parolas,

do, por montri NUNon, rolas

AS-finaĵo. Mus' petolas²³

nun ĝin kato ne kontrolAS.

Por prezencaj verboj stataj,

jenaj vortoj estAS frataj:

starAS, klarAS kaj avarAS,

kuŝAS, sidAS kaj avidAS,

estAS, restAS kaj modestAS.

PROVERBOJ

*Kiu panon donas, malsaton ne
konas.*

*De guto¹ post guto dis-falas
granito².*

Ne helpas spegulo³ al malbelulo.

Sen-cela vivo estas frua morto.

Pli efike ol bato pelas⁴ malsato.

1. pluv'ero/ 2. tre malmola ŝtono/
3. vitro-peco, en kiu oni rigardas
sin/ 4. igas iri, agi.

1. pra-loĝantoj de Ameriko/ 2. nobelo: riĉa kaj alt'ranga homo en tiu epoko/ 3. granda kaj festa manĝo/ 4. prezentis manĝaĵon al gastoj/ 5. arbo-ŝelo uzata kiel gust'ig'ilo/ 6. malriĉeco/ 7. ter'laboristoj de la nobeloj/ 8. abunda: pli ol sufiĉa/ 9. pan'semoj/ 10. manĝaĵo/ 11. kapo de panherboj, en kiu sidas la semoj en vicoj/ 12. sin mallevas/ 13. tro memfide/ 14. malsimpl'eco/ 15. ventrodoloro/ 16. i-vorto/ 17. nun-tempo/ 18. en-tiru scion en vin/ 19. centro de pensado/ 20. konstati: veni al certa scio aŭ opinio/ 21. ĝuste taŭgas por io/ 22. kompas: ilo, kies montrilo ĉiam direktiĝas al nordo/ 23. estas tre vigla pro ĝojo.

HELPU NIN PER VIA OPINIO!

La redaktist'aro de JUNA AMIKO deziras daŭre pli-bonigi la revuon. Tio igas necesa havi vian opinionon pri nia laboro. Se vi intencas helpi, bon'volu respondi al la subaj demandoj.

1. Kiujn temojn vi for-lasus el la revuo?
2. Kio mankas al vi sur la paĝoj de „Juna Amiko”?
3. Kiel vi opinias pri la lingvaĵo de la revuo?
4. Kiuj artikoloj plaĉis al vi?
5. Ĉu vi estas kontenta pri la aspekto de la revuo?
6. Ĉu vi trovas la revuon multe-kosta?
7. Kiel atingi pli vastan popularecon?
8. Kiel instruisto de Esperanto, ĉu vi povis uzi kelkajn artikolojn, ludojn, enigmojn k. t. p. dum aŭ post la lecionoj?
9. Kian opinionon havas la plenaĝuloj pri „Juna Amiko” en via klubo aŭ societo?
10. Ĉu vi rekomendas la revuon al viaj amikoj kaj kursanoj?

Ĉe respondo, sufiĉas aludi la numeron de la demando. Sendu viajn rimarkojn al Géza Kurucz, Hítel u. 10. fszt. 16., H—6000 KECSKEMÉT, Hungario.



1. Tra unu pordo oni en-iras, tra tri pordoj oni el-iras. Kaj kiam oni eliras, tiam oni en-estas.
2. Ĝi estas ĉiam proksima, sed vi neniam ĝin atingas. Kiam vi preskaŭ tuŝas ĝin, tuj ĝi akceptas alian nomon.
3. Oni ne manĝas ĝin, oni ne trinkas ĝin, tamen ĉiuj homoj trovas ĝin bon'gusta.
4. Ju pli oni al-donas, des pli malgranda ĝi fariĝas; ju pli oni forprenas, des pli granda ĝi fariĝas.
5. Kiam la dentoj doloras la leporon!¹
6. Mi havas en mia poŝo pli multe da mono ol la plej riĉa homo en Usono. Ĉu vi kredas tion?

El „Miru! Pensu! Ridu!”, de Paul Bennemann

1. long'orela sovaĝa kurema besto.

K
estas
T **10?**

1. ĉemizo; 2. morgaŭ; 3. kiso; 4. truo; 5. kiam hundo ĝin kaptas; 6. Jes, ĉar la plej riĉa homo de Usono havas en via poŝo nenion.

★ 13-jara knabo deziras korespondi en Esperanto kun eksterlandaj komencantoj. Adreso: *Marco Focaccia*, Via Fleming 19, I-20 147 MILANO, *Italio*.

★ *Emiliana Morini*, Via Fleming 6, I-20 147 MILANO, *Italio* serĉas leteramikojn 14—15-jarajn.

★ 12-jaraj komencantoj volas korespondi kun samaĝuloj el la tuta mondo. Skribu al: *Annamaria Gurobi*, Csokonai u. 11/a, H-8500 PÁPA, *Hungario*.

★ Geknaboj el Ukraino deziras havi eksterlandajn plumamikojn. Skribu al ilia gvidanto: *Vasilij V. Grigorenko*, ul. Ciolkovskogo 67, kv. 197, POLTAVA-28, 314 028 *Sovetunio*.

★ Gelernantoj 13-jaraj deziras korespondi kun samaĝaj geknaboj el la tuta mondo. Skribu al: *Lernejo de l' Paco, Esperanto*, Platz O. d. F. 12., DDR-195 NEURUPPIN, *GDR*.

★ Deziras korespondi, interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn 15-jara lernanto *Andreo Horev*, ul. Sajfulina 4, Visokovoltnij masiv, TAŠKENT 125, 700 125 *Sovetunio*.

★ Lernantino 11-jara serĉas skribemajn leteramikojn. Adreso:



Ekaterina Sentova, bl. 3, ap. 6, 2080 ZLATICA, *Bulgario*.

★ 14-jara lernantino, kiun interesas moderna muziko kaj kolektas bildkartojn pri floroj, deziras korespondi kun eksterlandanoj. Skribu al *Daiga Neilande*, Glika 9—2, RIGA-14, *Latvio, USSR*.

★ Diversaĝaj anoj de Riga Junulara Esperanto-Klubo deziras korespondi tutmonde. Skribu al: *Dace Ogrena*, RIGA-50, P. k. 45, *Latvio, USSR*.

★ 14-jara lernantino, kiu kolektas kolorajn bildkartojn, fotojn de gekantistoj kaj interesigas pri moderna muziko, serĉas geamikojn en la tuta mondo. Adreso: *Vilija Staraznickaite*, SU-234 365 STAKLISKES, Prienu raj, *Litovio, USSR*.

JUNA AMIKO

Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

de la Hungara Esperanto-Asocio (H—1363 Budapest 5, Pf. 193.). Responda eldonisto: TIBOR VASKÓ. Redaktoro: GEZA KURUCZ. Kunlaboratoj: D. Berndt (GDR), H. Boffejon (Svislando), M. Boulton (Anglio), J. Chvošta (Ĉeĥoslovakio), As Grigorov (Bulgario), R. Grinšpan, L. Jevsejeva (Sovetunio), E. Linz (Aŭstrio), R. Okumura (Japanio), G. Osz (Hungario), B. Ragnarsson (Islando), Z. Rehonić (Jugoslavio), G. Silfer (Italio), J. H. Sullivan (Anglio), M. Turin (Francio), J. Zăgoni (Rumanio), W. Zytyński (Pollando). Grafikistoj: J. Klement, P. Rak (Ĉeĥoslovakio), S. Plungor (Rumanio), E. Váli Z. Vámos (Hungario). Lingva revizio: A. Lienhard (Francio), A. Pechan (Hungario).

Kiadói Főig. engedélyszáma:

Minisztertanács Tájé. Hív. — III 2636 A6



DIFERENCO


„Diru al mi la diferencon inter fulmo kaj elektro!” sin turnis instruisto al lernanto.

„Fulmo estas sen-kosta; por elektro, oni devas pagi”, respondis li rapide.

KONKLUDO¹

Instruisto en knabina lernejo: „Ni do konstatis, ke la vira cerbo² superas la virinan laŭ grandeco. Kion vi povas konkludi el tio?”

Lernantino: „Ke la kvanto aŭ grandeco ne gravas, sinjoro instruisto”.




IGOR KAJ LIA AMIKO

Igor estas 6-jara. Li diras al sia amiko:

„Boris, via panjo estas instruistino; tamen, vi ne scias skribi eĉ unu vorton.”

„Kaj via paĉjo? Li estas dentisto; tamen, via malgranda frateto ne havas eĉ unu denton.”



1. konkludi: veni al konstato, al rezulto/ 2. centra organo de la pensado.